

## TESTO 31

### Ekzerco 1. Kompletigu la vortspacon.

1. Kontentigi ĉiujn eĉ **ng** **l** ne povas.
2. Kapo kun herbo, sen guto da **rb**.
3. Mi makleras pri ĉiuj komercaĵoj de la urbo Roubaix, speciale pri la **dr** **p** kaj teksaĵoj ĉiuspecaj.
4. Laŭ mia **mp** **s**, la latina ne helpas por la kompreno de fakesprimoj, kiuj troviĝas en la modernaj eŭropaj lingvoj.
5. Por handikapuloj kaj maljunuloj estas speciala **ft** al la observoturo.
6. La kuracisto enpuŝis **n** **dl** en la brakon de la paciento, kiu malfermis la okulojn kaj post fluga alrigardo al li serĉe konstatis, ke por fari bonon oni ja devas fari doloron.
7. Mia ĉefa agado estis preparado kaj kuirado laŭ diversaj **c** **p** **t**, kiuj entenis pomojn.
8. Plurdek parlamentanoj esprimis sian **mp** **t** kaj ofertis sian subtenon al la celoj de nia asocio.
9. Ĉiuj abiturientoj ricevas **d** **nt** mezlernejan diplomon, kies vera valoro tre varias.
10. La pastroj balancadis la fumilojn kaj la gefianĉoj donis unu al la alia la manon kaj ricevis la **n** de la episkopo.

### Ekzerco 2. Finskribu ĝustan vorton.

1. La slovaka *bryndza* estas mola, **kn** **d** **t** kaj salita ŝaffromaĝo, iomete simila al kazeo.
2. Pro **st** **k** de la eŭropaj oficistoj, la planitaj du tagoj da diskuto pri la “lingva lernado kaj diverseco” fariĝis nur unu tago.
3. Nestor, korpulenta, blankharara maljunulo kun helbluaj okuloj kaj kara rideto zorgis pri la monaĥejo, helpis lin du knaboj, kiuj **p** **ŝt** la monaĥejajn kaprojn.
4. Katja Lampinen debutis kiel esperantlingva preleganto prezentante nelingvan komunikadon, la signifon de **g** **st**, voĉtono kaj pozo.
5. Bronzetti ankaŭ **c** **t** la unuan regularon de la Konsilio de EU (1958), laŭ tiu regularo la Komisiono havas naŭ oficialajn lingvojn.
6. Danke al la naturdonacoj, Oke povis entute dediĉi sin al sia hobbio kaj ne plu bredi vulpojn por akiri peltaĵojn – laboro, kiu komencis **n** **ŭ** lin.

7. La mutulino ĵus leviĝis, sin lavis kaj sin vestis por eliri, ĉar je la sesa ŝi devas esti ĉe la farmisto Klomp por **m** **k** la bovinojn.

8. La tendaro okazos apud Tomsk en turistejo, ni strebos variigi la loĝ-kondiĉojn por ĉies poŝo: 1–3-litaj ĉambroj, amasloĝejo, **t** **d**.

9. Mi prezentis la ĉemizon nomatan *Igbo-kome*, farita el la ŝ **f** nomata *Bazin*.

10. Mi malfermis la okulojn kaj ekvidis Kaliniĉon, kiu sidis sur la s **jl** de la duonmalfermita pordo.

### Ekzerco 3. Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

bor', seg', varm', akcel', migr', friz', risk', rab', brav', pioĉ'.

1. Kristoforo Kolumbo kolektis en la havenurbo Palos **v** **l** por siaj tri karaveloj, sed la maristoj de Palos estis timigitaj de lia ekspedicio.

2. Per grandegaj **r** **l** la kolonianoj traboris la arbon en multaj lokoj, hakadis en la daŭro de ses semajnoj kaj fine ĝin faligis.

3. La *Granda Koliziigilo de Hadronoj* (GKH) estas la plej grava **k** **l** de partikloj, kiu situas ĉe la landlimo inter Francio kaj Svislando, proksime al Ĝenevo.

4. Elektu ĉapon, kiu laŭbezzone kovras ankaŭ la orelojn – prefere difekti la **r** **ĵ** per la ĉapo ol lasi la froston fuŝi vian multekostan vojaĝon en Nordio.

5. La pastro stariĝis antaŭ Helga, por ŝin defendi kaj ŝirmi, sed unu el la **b** **t** frapis per sia peza fera martelo lian frunton, tiel ke ĝi frakasiĝis kaj senviva li falis teren.

6. Atakoj de la indiĝenaj popoloj ne senkuraĝigis la **s** **m** vojaĝanton eniri la sekvan, multe pli danĝeran veturadon tra alia parto de la sudamerika tropika ĝangalo.

7. Unu viro grimpis al la supro de la arbego kaj per sia **g** **l** forsegis malgrandan pecon de unu el la supraj branĉoj.

8. En la pasinteco ne mankis interŝanĝo de **g** **t** kaj komercaj kaj kulturaj varoj inter Hispanio kaj Irlando.

9. Se Lisa eniros la kavernon, Jurgen devos sekvi ŝin, ĉar tio decas al viro kaj li scias, kiel facile ŝi **l** **r** **m** **ĝ**.

10. La loĝantoj de Val d'Agri plu perlaboras la striktajn vivrimedojn **ĉ** **t** la teron kaj produktante fruktojn, olivojn kaj mielon, ne malsame ol en la pasintaj jarcentoj.

#### **Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

1. Fojfoje nur la plej fortaj homoj, uzante la \_\_\_ povas eniri tramon aŭ metroan trajnon, patrinoj kun infanĉaroj kaj pensiuloj restas ekstere kaj atendas la sekvan.

- a. virtojn   b. kubutojn   c. nadlojn   d. kronojn

2. Kompreneble, pluraj landoj havas flagojn kun similaj simboloj: aglo, stelo, \_\_\_ ktp. sed escepte de tiu aspekto ili estas malsamaj.

- a. krizo   b. beno   c. krono   d. metodo

3. La Manifeston de Prago subskribis pli ol 10 mil personoj, por ŝpari miajn \_\_\_ mi ĝin ne komentu!

- a. angulojn   b. pretekstojn   c. trikotojn   d. nervojn

4. Reago de kobro estas fulmrapida, ekzemple al sin aeren ŝetinta \_\_\_, ĝi neniam ebligas, ke tiu falu surteren kaj kaptas ĝin ankoraŭ dum la flugo.

- a. muso   b. ŝvito   c. veŝto   d. profesio

5. Kuracisto en la urbeto Hyde riveligis kiel unu el la plej \_\_\_ amasmurdistoj en la historio de Britio.

- a. probablaj   b. profundaj   c. kruelaj   d. diafanaj

6. La foto montras sur la \_\_\_ de 25-jara frakseno la koridorojn de la larvoj de du insektoj, kiuj mortigis tiun junan arbon, kiu estus povinta vivi pli ol 300 jarojn.

- a. tereno   b. trunko   c. traktoro   d. verto

7. Theresa May por \_\_\_ tiujn en la lando, kiu subtenis breksiĝon, indikas, ke ŝi volas rezigni pri libera movado de homoj, sed ne pri libera movado de varoj kaj servoj.

- a. komplezi   b. distingi   c. boji   d. fanfaroni

8. Svislando kuŝas sur la limo inter latindevenaj kaj ĝermandevenaj kulturoj kaj devas ĉiutage maĉi, \_\_\_ kaj digesti tiujn diferencojn.

- a. escepti   b. insulti   c. entrepreni   d. gluti

9. La Oficeja Komisiono, anstataŭ solvi problemojn, pliprofundigis ilin kaj pli \_\_\_ la profesion stabon.

- a. ĉagrenis   b. knedis   c. meditis   d. pumpis

10. Aŭstraj kancelieroj, ĉu dekstraj, ĉu maldekstraj, ĝis nun \_\_\_ sian taskon al la provincaj aŭtoritatoj, kiuj ne intencas la problemon juste solvi, eĉ se ili laŭleĝe kaj laŭkonstitucie respondecas.

- a. admonis   b. dungis   c. importis   d. delegis